


*Horizontale* 1. ruĝhara 5. konforma al la realo 8. flugmaŝin' 9. senvestite 10. ruĝa bero 12. intesta en laŭ medicino (radiko) 15. malbona sent' 16. granda altaĵo 18. rusa sankta bildo 20. valora por io 21. malhel-kolora 23. malgranda ero de elemento 26. tabelvorto (akuzativo) 27. poŝtsendaĵ' 29. instruita (radiko) 31. korpulenta 32. monato 33. tabel' ekz. kun nomoj 34. marmoviĝo

*Vertikale* 1. granda diskonatec' 2. maldika ŝnuret' 3. ekscita travivaĵ' 4. blanka fromaĝo 5. hom' 6. elstara personaro 7. odoro, gusto 11. matematika esprim' 13. ĉion ampleksa (radiko) 14. interlig' al iu aŭ io 17. kantobird' 19. tablo por instruistoj 21. metal' 22. mineral' 24. stelbild' (konstelaci') sur norda ĉielo 25. dekpieda markrustulo (emblemo de UK en Fortalezo) 28. malplezuro pro neokupiteco 30. ronĝulo

Solvo el julia SF.: Julio kaj Petro

| | Julio | Rjuzo | Petro | Paŭlo | Valdiro |
|---|---|---|---|---|---|
| Lando | hispanio | japanio | germanio | bulgario | brazilo |
| UK-oj | 15 | 6 | 9 | 3 | 5 |
| Vojo | 800km | 9700km | 1200km | 1600km | 8500km |
| Trinkaĵo | kafo | akvo | vino | biero | akvo |
| Ĉemiz | ruĝa | blanka | flava | verda | blua |

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| o | | | | | |





# Stralsundaj frekvencoj

**Per Esperanto por popolkompreniĝo**

jaro 2002 septembro

Rigardas la floroj ĉiuj
avide eksteren al sun';
forfluas riveroj ĉiuj
al maro brilanta en lum'.
Flirtadas la kantoj ĉiuj
al mia bel-amatin'.
Kunportu la larmojn kaj ĝemojn,
vi kantoj de melankoli'!

laŭ Heinrich Heine

Kontaktoj: Gun.Eb@t-online.de aŭ +49 3831 490003

## *Ĝojiga malkovro*

Dum mia kuraca restado en la bela banloko Františkovy Lázně mi faris surprizan kaj miraklan malkovron. En la parko mi ne nur trovis Goethe-on (kiel skulptaĵo de lia kapo) ĉe fonto, sed ankaŭ Zamenhof-on! Proksime de lageto kun fontanoj, rekte ĉe iu *„pramen"* (kuraca fonto) troviĝas sur marmora tabulo portreto de Ludoviko kun jena en-skribaĵo: „1914 estis ĉi tie inaŭgurata kaj 1938 detruata la unua monumento honore al L. L. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto, de la in-ternacia lingvo".

Tiun ĉi tabulon starigi estis decidate de esperantistaj handi-kapuloj 1991 okaze de ilia kongreso. Sed denove ĝi estis detruata 1994. La Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun subtenado de britaj esperant-istoj zorgis pri la riparo de tiu ĉi memoraĵo 1995.

Mi opinias, ke tiu ĉi afero reflektas la sorton de E. Malgraŭ ĉiuj kontraŭuloj E. restas vivanta, ĉar ĉiam denove amikoj trovas sin, kiuj portas plu la ideon kaj rimedon por paco kaj popolamikeco.

Curt

***Lingvo -***

post la kisado la plej emocianta komunikilo, kiun eltrovis la homaro, la fonto de ĉiuj miskomprenoj.

*Antoine de Saint-Exupéry*

*anonima*

## Universala Kongreso de Esperanto okazis ĉijare en Brazilo

Fortaleza, la ĉefurbo de la brazila ŝtato Ceara, de la 3a ĝis 10a de aŭgusto gastigis la Esperantistojn el la tuta mondo. La kongresa temo estis: Diverseco – ŝanco, ne minaco. Brazilo estas granda lando kaj sekve ekzistas granda kultura diverseco kaŭzita speciale de diverskulturaj en-migrintoj. Starigis sin la demando, ĉu tia diverseco mondskale malhelpas aŭ helpas la tutmondiĝon, la alproksimiĝon de la popoloj.

La konkludo estas, ke pro la tutmondiĝo surbaze de iu neneŭtrala nacia lingvo, ekzemple la angla, la diversaj kulturoj, speciale la malfortaj, vere estas minacata. Ĉu ne eĉ la plej perfekta parolanto de iu fremda lingvo estas kiel handikapulo parolante kun denaska reganto de la koncerna lingvo. Tamen ni ĉiuj ja volas la alproksimiĝon, ĉar ĝi subtenas la komprenon inter la popoloj. Per la babi-lado la homoj scias pri la problemoj de la aliaj kaj scipovas reagi.

Por ni esperantistoj la respondo estas klara. Nur tute neŭtrala lingvo samtempe helpas la interkomprenon kaj malhelpas la perdon de la propra kulturo. Ankaŭ neŭtralan duan lingvon kiel Esperanto oni pene devas lerni kaj estas „handikapulo", sed la aliulo vid al vide ankaŭ.

La kongresanoj en Fortaleza diskutis jenajn demandojn:

1. Kiuj estas la bonaj kaj malbonaj aferoj de la globalismo respektive de lokismo?
2. Kiuj estas la ĉefaj demandoj pri socia kaj kultura diverseco en via propra socio? Kion oni faras pri ili, kaj laŭ kiuj principoj?
3. Kion fari pri etnaj kaj lingvaj minoritatoj, kiuj ne havas la rimedojn por defendi sin kontraŭ la efikoj de la globalismo?

4. Ĉu eblas atingi ian ekvilibron inter la avantaĝoj de globalismo kaj la avantaĝoj de lokismo?

5. Kiun rolon Esperanto kaj la E-movado povas aŭ devas ludi sur tiu ĉi kampo?

Entute okazis tri aranĝoj de 90min al tiu ĉi temo kun elstaraj personoj.